

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)



NIAJ PLANOJ ĈE LA REGULA KUNVENEJO

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama, okazas kurso kaj regulaj kunvenoj. Vidu la suban tabelon.

tago	klaso	#	gvidanto	lernolibro / legata libro ktp	noto
sabato	rudimenta	2	TAĴIMA Norio	"Hanako lernas Esperanton"	por 13 semajnoj
	DEZERTO	6	DOI Ĉieko	"Tra Dezerto kaj Praarbaro"	
	LANTI	3	DOI Hirokaz	"Vivo de Lanti"	ĉi-junie, ne okazos
	Jokohama Salono	8	(sen aparta gvidanto)	1a kaj 3a semajnoj de monato: "Japanio Kalejdoskope" 2a semajno de monato: verkado de eseoj 4a semajno de monato: komuna tradukado el la japana (el "Makura-no-soosi")	ĉi-junie, la 9-a de junio estu traktata kiel la 1a semajno
merkredo	merkreda	5	DOI Ĉieko	"Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj"	
# = nombro de klasanoj lastatempaj, inkluzive de la gvidanto					

HAMA-RONDA VESPERO

- * junio 16 (sab) 17h00-19h00 ĉambro 705
- * **prelegonto:** S-ino DOI Ĉieko
- * **temo:** pri HASEGAWA Teru, t.e. Verda Majo
- * **enhavo:** Esperantistino HASEGAWA Teru, plumnomo Verda Majo, naskiĝis antaŭ 100 jaroj. Ŝi iris en Ĉinion, la landon de sia edzo, kaj tie faris agadon kontraŭ la japana agreso en Ĉinion. La prelegonto revuos ŝian vivon.

GASTO VENOS EL NEPALO

- * julio 7 (sab)
- El Nepalo vizitos nin unu el la ĉefaj movadantoj de tiu lando, s-ro Bharat Ghimire [barat gimire]. Li rondvizitos klasojn dum la kurso-horo inter la 15a kaj la 17a. Poste, ni invitos lin al komuna vespermanĝo. Ni havos ekskurson kun li en la sekvanta dimanĉo, la 8a de julio.

TIEL OKAZIS

NI EKSURSIS EN KAMAKURA

- * majo 5 (sab/feria tago)
- * gastoj: s-ro Tom Rubinstein kaj lia neesperantista edzino Ŝaron, el San-Diego, Usono
- * ekskursintoj: s-ro Suzuki Keiichiro, s-ino Miyazaki Hideko, s-ino Aida Yayoi, ges-roj

Sibayama Zyun'iti kaj Noriko, kun la gastoj Tom vizitis Jokohamon okaze de sia profesia konferenco, kaj intencis havi kontakton kun esperantistoj. Ĉar la dezirata tago estis japana feria tago sen regulaj kunvenoj, s-ro Suzuki, la Delegito en Jokohamo, invitis aliajn por ekskursi

■ Eldonas Doi Hirokaz ■ Redaktas la organa fako de JER: Sibayama Zyun'iti
 ■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458
 ■ Retadreso: hamarondo@yahoo.co.jp ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>
 ■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

en la historia urbo Kamakura.

S-ro Suzuki kondukis la gastojn ĝis la Stacio Kita-Kamakura, kaj tie ni komencis la ekskurson. Antaŭtagmeze ni vizitis la templon Enkaku-zi, kaj vizitonte la Grandan Budhon, ni embarasiĝis, ĉar tramo de la Stacio Kamakura al la proksimo de la Granda Budho estas tro okupita, ke oni devus atendi unu horon por entramiĝi. Ni do decidis marŝi, kaj dumvoje ni tagmanĝis. Ni vizitis la templon Hase-dera, kaj poste la Grandan Budhon. Feliĉe de tie ni prenis buson reen al la centro de Kamakura kaj vizitis la ŝintoisman sanktejon Turugaoka-Hatiman. Vespere, s-ino Aida hejmen iris, kaj aliaj sesope iris ĝis Sakuragityoo, por kune vespermanĝi, ĉar tiu loko estis proksima al la hotelo de la gastoj.

HAMA-RONDA VESPERO

* majo 19 (sab) 17h00-19h00 ĉambro 705

* preleginto: S-ino Mireille GROSJEAN (Mirejo)

* ĉeestis: 20, inkluzive de la preleginto

* temo: AFRIKAJ ETOSOJ

Mirejo, nomanta sin moderna “nomadino”, nun vagas Azion, sed ĉi-foje ŝi temis pri Afriko; ne nur pri tiea esperanta movado, sed ĝenerale

pri la etoso sentita tie. Ŝi estis en Benino kaj Senegalio, ĉemaraj landoj, kaj estis en Burundio, ĉelaga interna lando. Montrante projekciitajn fotojn memfaritajn, ŝi verve prirakontis la etoson.

Ŝi ekzemple montris domojn sen muro, aŭ kun muro truita por ke vento libere fluu, aŭ duŝejon sen varmigita akvo sed agrabla, ĉar akvo mem estas varmeta. Ŝi montris scenon, kie moderna kaj tradicio kunestas --- tamen tia samo troveblas en Japanio.

Ŝi instruis Esperanton al junuloj, kaj tie ŝi servis teon al siaj lernantoj --- jen tio mirigis la lernantojn, ĉar ne kutimis al ili, ke “blankulo servas nigrulojn”.


Ŝi rakontis al ni sperton junaĝan en sia svisa hejmo, ke tien vizitis afrikanoj studentaj en Svisio. Interesa epizodo estis, ke afrikano nomis ŝian patrinon “bovino”; tio laŭvorte sonus insulta al eŭropanoj. Sed la vera senco estis, ke bovo estas besto laktodona, trezora, kaj la afrikano nomis la patrinon “trezoro”. Jen tio estas ekzemplo “relativigi kulturan kodon”, esenca por interkulturaj kontaktoj.

ESEJOJ

Rara sperto en aviadilo

KOGAKURA Hiroko

Mi prenis aviadilon de Mijazaki al Haneda en la 13a de aŭgusto lastjare. Tiam tri junuloj sidis najbare al mi. Ili prenis broŝurojn el siaj sakoj. Sur la kovrilo de la broŝuro estas “Demandoj por konkurso de kvizo por alt-lernejanoj”. Mi ekmemoris faman titolon “Konkurso de kvizo de alt-lernejanoj” en televido ĉiujare. Do mi demandis al unu el ili, “Ĉu vi partoprenos en la konkurso de kvizo kiel reprezentantoj de Mijazaki?” Li respondis, “Jes, ni partoprenos en ĝi kiel reprezentantoj de la suda parto de Kjuŝuu. Ni estas lernantoj de Altlernejo Oomija.” Ankaŭ mi studadis en tiu altlernejo antaŭ longa tempo. Kaj ili tuj ekstudis post delandiĝo de nia aviadilo. Ĉar mi volis scii, kiaj demandoj estis prezentitaj ĝis



nun, mi ŝtelrigardis la demandojn en la broŝuro. Estis ege malfacilaj demandoj, kiujn mi tute ne povas respondi. Tiam mi trovis unu demandon sur lia papero. Tie estas, “Kio estas lingvo, kiun pola okulkuracisto kreis en 1887 kaj kiu signifas *kibousuruhito* japane?” Mi alparolis lin, “Permesu al mi ĝeni vin, sed ĉu la respondo estas Esperanto, ĉu ne?”, kaj mi montris al li “La Revuo Orienta” kiun mi hazarde kunportis. Li surpriziĝis kaj demandis, “Kia lingvo estas Esperanto?” Do mi simple klarigis pri Esperanto. Li tre interesiĝis pri ĝi.

La konkurso de la kvizo estis elsendita en televido en la 9a de septembro. Mi esperis ke ili akiru superan premion. Sed bedaŭrinde ili malsukcesis ĉe la unua matĉo.

La flava florbazo – Memore al s-ro Neumann –

HIROSE Kanae

“Ha, ĉi tiel!”, en la fundo de la tenejo, hazarde mi trovis florbazon inter malnovaj ceramikaĵoj jam de longe forlasitaj. Ĝi estas flava, 20 cm-jn alta inklude la piedon. Mi rememoris, ke iam rimarkinte fendeton sur la vazo, mi pensis ke ĝi ne plu taŭgos por floroj, kaj iom embarasiĝis ĉu mi ĝin forĵetu aŭ konservu. Tiam antaŭ mi momente ŝvebis la figuro de s-ro Neumann kun rideto. Nun senhezite mi ĝin metis sur la breton de la tenejo.

Ĉu vi scias aŭ konas s-ron Hans-Dietrich Neumann? En 1965, li partoprenis en la 50-a UK(Universala Kongreso) de Esperanto en Tokio, sed post la Kongreso li ne reiris al sia hejmlando, Germanio. Japana vivo precipe la kulturo tiom plaĉis al li, ke li definitive loĝis en Japanio, li eĉ eklaboris por vivteni sin. Sed kia sortobato! Li forpasis en 1969. Kiu antaŭvidus lian mallongan vivon. Li estis en tridekaj jaroj. La florbazo estis unu el liaj postlasitaj objektoj, kiujn oni vendis per aŭkcio. De tiam jam pasis pli ol 40 jaroj.

La 50-a UK estis por mi vere memorinda evento, ĉar dank’ al ĵurnala raporto pri ĝi, mi interesiĝis pri Esperanto kaj eklernis la lingvon. Iun tagon mia amiko invitis min al la kunveno “Internacia Ĵaŭda Tagmanĝo”. Li diris, ke en ĝi iu ajn povas partopreni senanonce kaj la kunvenejo situas tuj apud la Stacidomo Tokio. Bonŝance, de mia oficejo ĝis la kunvenejo oni bezonis piede nur dek minutojn. Malgraŭ novico mi kuraĝis ĉeesti la kunvenon kaj pasigis ekscitan tagmezan laborpaŭzon inter esperantistoj. Tie mi unuafoje praktikis Esperanton kiel internacian lingvon, kvankam nur per salutvortoj. Mi salutis alilandanon, tiu ĉi ĝentile resalutis min kaj aldonis sian nomon. Li estis s-ro Neumann. En la kunvenejo mi ofte vidis, ke li afable alparolis al novuloj. Se li trovis balbutulon konfuzitan, li lerte helpis ĉi tiun daŭrigi la interparolon: ripetis ĵus diritajn vortojn, ŝanĝis komplikajn frazojn al facilaj eĉ kun gestoj ktp. Mi ĉeestis ne ĉiufaje, sed kiom mi povis.

En 1969, en frua printempo mi estis informita, ke s-ro Neumann sinmortigis, ke li suferis de melankolio. Ĉu vere? Kial tiel? Neniel mi povis konjekti la kaŭzon. En la kunveno li estis ĉiam simpatia kaj aspektis optimisma. Postan tagon oni okazigis aŭkcion tie, kie li loĝis. Mi aŭdis, ke la vendosumo estis sendita al liaj gepatroj en Germanio.

Kiam mi aĉetis la florbazon, mi senintence renversis ĝin la fundon supren kaj tie en la kaveto trovis vakson algluiĝintan al la fundo. Ĉu li uzis ĝin anstataŭ kandelingo? Mi rememoris iaman bankedon ĉe germana familio. En obskura ĉambro nur kandeloj lumis kaj gastoj gaje interbabilis. La sceno estis al mi ekzotika kaj kontentiga.

Sed ĉe s-ro Neumann kandeloj kiel efikis? Ĉu la flamoj varmigis lian animon? Ĉu ne okazis, ke sub la ombro de flamanta kandelo li sola trinkante alkoholaĵon sopiris sian hejmlokon kaj eltenis solecon? Iu konsilis, ke kontraŭ melankolio plej grava estas bona interkomunikiĝo per pozitivaj vortoj reciprokaj. Ĉu ni nur akceptis de li favoron kaj ne redonis al li tion?

Se mi vidas la flavan florbazon, mi rememoras s-ron Neumann, kun bedaŭro kordolora.

(2012-5-23)

Letero de leganto

el Samarkando, Uzbekio

Kara Kiyoshi-san kaj Yayoi-san,
[...]

Kiel vi scias, ĉiam kun granda plezuro mi legas viajn tradukojn en "Novaĵoj Tamtamas", kiuj konatigas min kaj aliajn legantojn kun pecoj de japana literaturo.

Lastatempe mi volonte konatiĝis kun la fabelo de elstara ruslanda blinda verkisto Vasilij Eroŝenko. Dankojn pro via senlaca kaj fruktodona traduklaboro!

Bonan sanon kaj longan feliĉan vivon al vi!

Salutojn al ĉiuj viaj samrondanoj!

Kore kaj bonhumore, Anatoli kaj familio

BELETRO

Unu pirarbo --- rakonto de Serbio (3)

Vasilij Eroŝenko

Komuna traduko esperanten de Jokohama Salono

原作：ワシリー・エロシェンコ「一本の梨の木」(1921)



Parto 4 (laŭ Mizro Iwaya)

Nun la pastro elspiris kun kora faciliĝo, kaj komencis iri plu kun la plej juna frato.

“Viaj fratoj komencis ĉiuj fierindan entreprenon. Ankaŭ vi deziru egale fierindan laboron kiel viaj fratoj. Kion en la mondo vi preferas fari?”

Post kelke da vojaĝo, la pastro demandis la junan fraton tiamaniere.

“Jes, koran dankon s-ro Pastro. Tamen mi ne havas ian specialan volon kian havis miaj fratoj... Mi deziras nur belan kaj vere bonaniman edzinon. Tio estas la tuto kion mi deziras.”

La pastro aŭdis tion kaj tute embarasiĝis. Kio alia en la mondo povas esti pli grava kaj malfacila demando kiel la lia?

“Nu, via volo fakte embarasas min. Bela kaj bonanima virino fakte ekzistas. Eĉ trion da tiaj ĝustaj mi trovas en la mondo. Tamen unu el ili jam edziniĝis, kaj pro tio ke ŝi fariĝis tro malriĉa kaj ekhavis tro da infanoj, ŝi fariĝis freneza kaj nun frontas al morto en frenezulejo. Unu alia intencis eskapi el malriĉeco, kaj nun estas kaptita en iu malliberejo. La lasta estas sana kaj ne edziniĝinta, sed ŝi estas almozulino kaj nun petata edziniĝi al ok kolegaj almozuloj. Ha, kion mi povas fari?”

Eĉ la elstara pastro ne estas ĉiopova. Se li signus krucon, ĉio realiĝus antaŭ li. Sed tiu demando estis escepta. Li kompatis la junan fraton kiu aspektis tute senesperiginta, kaj komencis kuraĝigi lin.

“Nu, vi ne devas perdi esperon. Ni kune daŭrigu nian vojaĝon por trovi iun taŭgan ie en la mondo.”

Li klopodis kuraĝigi la junan fraton kaj kune daŭrigis la vojaĝon.

Kiam ili du alvenis iun landon, ili aŭdis, tute mirinde, ke la princino de la palaco estas bela kaj bonanima junulino.

(Ni neniam aŭdis ke ekzistas tia bela kaj bonanima persono en tia altranga klaso. Ĉu la onidiro estas fakto? Se la princino estas vere bonanima kiel diras popolanoj, ŝi ne rifuzos nian proponon por edziniĝo pro la sola fakto ke la

proponanto estas malriĉa.)

La pastro konsideris tiamaniere, kaj diris al la juna frato:

“Nu, bone. Ni petos edziniĝon de la princino. Se ŝi ne akceptos tion, do ŝi ne estas tia persono kian vi deziras de ŝi. Nenio helpos tiam.”

La pastro iris al la palaco kun la juna frato por peti geedziĝon kun li. La princino fakte ne intencis rifuzi la peton pro lia malriĉeco.

Tamen antaŭ tio, ŝi jam ricevis du petojn prezentitajn de najbaraj princoj.

La slava kutimo procedas jene. Kiam pluraj kandidatoj petas geedziĝon kun unu sola fraŭlino, ĉiu kandidato metas po unu pomo sur la tablon de la petitino. Ŝi prenas unu el ili, tiun de ŝia preferata kandidato. Tiam la posedanto de la pomo elektiĝas edzo de la petitino.

Do ankaŭ la plej juna frato metis pomon sur la tablon de la princino. Sed ŝia patro, la reĝo, kial li bonvolus edzinigi sian filinon al tia malriĉa junulo? Li intencis malrealigi tian abomenindaĵon kaj finfine elbuŝigis jene.

“Ni ĉesu pri la elektado per pomo. Se nepre ekzistas ĝusta destino por li elektiĝi ŝia edzo, ni evidentigu tion per alia maniero.”

Tiam do la pastro diris jene.

“Nu, ni faru tiamaniere. La princino donu al la tri kandidatoj po unu novtigo de vinberarbo. La ricevinto plantu ĝin per si mem. En la sekva mateno ni vidu kiu el la tri ekportos vinberojn. La plantinto de tiu novtigo certe fariĝos ŝia edzo.”

La reĝo, la princino kaj ankaŭ la tri kandidatoj konsentis pri la propono. Ĉiu el ili, en sia propra maniero, pasigis timplenan nokton post la plantado.

Venis la mateno. La bela sunlumo briligis glacean kaj riĉan vinberaron sur iu vinberarbo. Tiu arbo estis ĝuste tiu, kiun plantis la malriĉa, juna frato. Ĝi estis fakte mistera kaj esperiga frukto.

La pastro kondukis la novajn geedzojn, kiuj havas puran kaj bonaniman koron kaj karnon, al kvieta domo en la profunda arbaro, kaj malaperis kvazaŭ en sonĝo. (daŭrigota)